22 -02- 1991

# Informilo

Monata revuo - Maandelijks tijdschrift - 11a j. n-ro 2, feb. 1991


## Estraro

*Prezidanto:* vakas.

*Sekretario:* Ivo Durwael, Paul Gilsonlaan 5, 2650 Edegem. Tlf. (03) 440 30 92.

*Financoj:* Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge. Tlf. (050) 33 00 04.

*Instruado:* Alex Humet, Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem. Tlf. (03) 239 21 69.

*Eksteraj rilatoj:* Jos Vandebergh, Ambachtstraat 39, 3530 Houthalen. Tlf. (011) 52 19 43.

## Komisiitoj

*Financoj:* Roland Rotsaert, Ivo Durwael kaj Paul Peeraerts.

*Eldona agado:* Chris Declerck, Gerrit Berveling, Rejna de Jong, Alex Humet kaj Paul Peeraerts.

*Manlibro de la aktivulo:* Marc Vanden Bempt, Duisburgsestraat 12, 3001 Heverlee. Tlf. (016) 20 14 53.

*Gazetara servo:* Guido van Damme, p/a FEL, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen. Tlf. (03) 234 34 00.

*Rebata servo:* Germain Pirlot, Steenbakkersstraat 21, 8400 Oostende. Tlf. (059) 70 87 00.

*Prelegvojaĝoj:* Hilde van Ingelgem, Arbeidsstraat 21, 9300 Aalst. Tlf. (053) 70 50 11.

# FEL-estraro: protokolo

9a de februaro 1991

## 1 Financo kaj planado

Ĉeestas: Ivo Durwael, Roland Rotsaert, Paul Peeraerts.

### 1.1 Spezokonto

La spezokonto de 1990 montras malgrandan gajnon de 68000 BEF. La plimulto de la eroj montras pozitivan evoluon kompare al 1989. Kotizoj altiĝis per 8%, enspezoj pro *Monato* per 6%, pro *La Jaro* per 12%, subvencioj per 6%. La vendoj de propraj kaj nepropraj eldonaĵoj en la libroservo konsiderinde altiĝis, kvankam ne estas eble kompari bone kun la antaŭa jaro pro alia librotena strukturo. Ankaŭ la vendoj de kursoj kaj vortaroj evoluis eksterordinare, supozeble ĉefe pro kampanjoj de nia milit-rifuzanto.

Malbone evoluis la vendociferoj de *Esperanto-Panorama*. Kvankam la enspezoj pro Belgaj abonoj altiĝis per 14%, tiuj pro Nederlandaj falis per 55%, el kio rezultis mezuma falo de 47%. Ankaŭ la enspezoj pro anoncoj falis konsiderinde pro forfalo de unu difinita anoncanto.

Ankaŭ falis la enspezoj pro grafikaj laboroj. La mendoj de neesperantistaj klientoj altiĝis per 60%, sed tio ĉi ne povis plenigi la truon kaŭzitan de la forfalo aŭ malaktiveco de kelkaj esperantistaj klientoj.

La bilanco restas stabila kun bilanctotalo de 8 milionoj da BEF.

Kvankam la rezulto de 1990 estas tute kontentiga, la buĝetado de 1991 devos esti tre prudenta. La perdoj de antaŭaj jaroj neniel rajtas ripetiĝi.





### 1.2 Buĝeto 1991

Pro manko de tempo, la punkto estas prokrastita ĝis speciala kunveno de la komisiono pri financo kaj planado, la 22an de februaro je la 16a h. 30.

### 1.3 Subvencioj

La subvenci-regularo de la provinco Antverpeno ŝanĝiĝis. Ekde 1992 ankaŭ ĝi subvencios la pruvitajn kaj antaŭanoncitajn aktivaĵojn. Krome minimume tri enloĝantoj de la provinco Antverpeno devos partopreni en la estraro.

### 1.4 Lifto

FEL proponos al Instituto Hodler ŝlosi la lifton de Esperanto-domo en Antverpeno, ekde kiam validos la leĝo pri liftoj (supozeble ekde la 1a de majo 1991). Ripari ĝin laŭ la nunaj sekurec-postuloj estas tro multekosta. Dum la marta jarkunsido vizitantoj povos do lastan fojon veturi per ĝi (je propra risko!).

### 1.5 Asekuroj

Asocioj kiuj organizas kunvenojn k.s. ekde nun devas asekuri sin kontraŭ la ĵargone nomata "civila respondeco". Laŭ nia specialisto Jan Bovendeerd la nuna poliso de FEL asekuras ne nur oficistojn kaj volontulojn, sed ankaŭ vizitantojn.

## 2 Administra parto

Ĉeestas: La samaj tri. La invitilo de Alex Humet perdiĝis kaj Jos Vandebergh malsanas.

### 2.1 Antaŭa protokolo

Neniuj rimarkoj.

## 2.2 Represo de *Monato* en evolulandoj

Jam plurfoje venis petoj por povi represi la magazinon *Monato* en iu evolulando, por povi oferti ĝin malmultekoste al triamondanoj. La estraro pretas liveri presfilmojn al organizaĵo kiu intencas serioze prizorgi la distribuon en la tria mondo kaj kondiĉe ke ĝi garantias liveri nur al la tria mondo. PP korespondos pri tio kun la koncernaj instancoj.

## 2.3 Represo de libroj en evolulandoj

Same venis peto pri represo de niaj libroj. Kvankam ankaŭ ĉi- rilate la estraro ne kontraŭas la principon, ĉiu aparta kazo devos esti submetita al aprobo. FEL ja subskribis kontraktojn kun siaj aŭtoroj en kiuj la eblecoj pri represo estas fiksitaj. Iu rekompenco de la eldonantoj do devos esti pridiskutata.

## 2.4 Prezentmaniero

Antaŭ kelkaj jaroj FEL decidis pri aparta prezentmaniero de ĉiuj siaj eldonaĵoj por la ekstera publiko. RR demandas sin, ĉu ankaŭ eldonaĵoj por la esperantista publiko (*Monato*, libroj) ne havu iun difinitan rekonilon. Estonte ni pli elstarigos la nomon de FEL sur niaj eldonaĵoj.

Kvankam la nomo de la eldonejo de *Monato*, de *La jaro*, de la *Stafeto*-libroj kaj de ĉiuj niaj eldonaĵoj estas Flandra Esperanto-Ligo (FEL), kaj kvankam ĉie tie estas menciita nur tiu nomo, plurfoje oni renkontas en aliaj lokoj misajn aŭ eksajn priskribojn kiel *eldonita de la Esperanto-domo en Antverpeno*, *eldono GCA*, *eldonita de Stafeto* ktp. PP estonte ĝentile atentigos la koncernan redaktoron pri la eraro. La membroj estas petataj averti la sidejon pri rimarkitaj eraroj.

## 2.5 Jarkunsido

La ĝenerala jarkunsido de FEL okazos en la sidejo, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, la **16an de marto 1991** je la 15a horo **kaj ne la 23an kiel unue planite**.

Inter la 13a kaj la 15a horo la domo estos malfermita por vizitantoj.

La jarkunsido traktos kiel kutime la administran kaj financan raportojn pri la antaŭa jaro, la elektojn de nova administrantaro, estraro kaj prezidanto. Okazos honorigo de sinjoro Cortvriendt, forpasinta honora membro de FEL.



La grupoj ne forgesu sendi la nomojn de siaj administrantoj por la jaro 1991 al la sekretario aŭ al la sidejo antaŭ la 15a de marto!. La administrantoj kiuj ĉeestos la ĝeneralan kunsidon ricevos senpagan libropremion.

Post la elektoj okazos diskuto pri la nova subvenci-strukturo (vd. venontan punkton.)

## 2.6 Subvenci-strukturo

Pro ŝanĝo de la subvenci-strukturo de la ministerio pri kulturo, la estraro proponas ŝanĝi la subvenciojn al siaj grupoj. Anstataŭ la nuna fiksa subvencio de 150 BEF por ĉiu paganta membro, la grupoj estonte ricevos nur po 50 BEF. Aldone al tio ili tamen ricevos subvencion por ĉiu pruvita aktivaĵ-horo. Aktivaĵoj povas esti kursoj, prelegoj, kongresoj, vizitoj ktp. Pliaj detaloj dum la ĝenerala kunsido de la 16a de marto.

## 2.7 Diversaĵoj

Honorigo de nia honora prezidanto Edward Symoens okazos en la komunuma domo de Kalmthout la 25an de majo.

Franca kongreso okazos en la apuda Boulogne-sur-Mer de la 26a de aprilo ĝis la 1a de majo. La programo aperis en *Franca esperantisto* de januaro.

Protokolis PP.

# Informoj de FEL

## Eldona agado

- *Urd Hadda murdita!* (Deck Dorval): presita, bindata.
- *Ŝirpecoj al la amatino* (Chris Declerck): enpaĝigota. Apero eble en marto.
- *La Fundamento sub lupeo* (Makkink): presita, bindata. Apero planita por la 1a de marto.
- *Renardo la Vulpo*: neniuj novaĵoj.

- *La Komencanto*: neniuj novaĵoj.
- Ni daŭre atendas por la historia libro la antaŭparolon de Claude Gacond. La kompostado de la cetero estas okazanta.
- *La septaga murdenigmo* (Gates): Aperis.
- Novelaro de Sullivan: akceptita de la komisiono. Ni atentas la kontrakton kun la aŭtoro.
- Poemaro de Marron: FEL ne eldonos.

## Memorigoj

- 23/2 Studotago por instruantoj
- 23/2 Prelego de Emile Van Damme en la lingvoborso en Bruselo + prezento de pedagogiaj ludoj de Ghislaine Tilleux + kantoj de Nikolin'.
- 2/3 Tago de Internacia Amikeco en Oostende
- 16/3 Ĝenerala kunsido de FEL (15a horo) kaj malferma tago (13a ĝis 15a horo) en la Esperanto-centro en Antverpeno
- 16/3 Ĝenerala kunsido de FLEJA ekde la 10a horo en la Esperanto-Centro en Antverpeno